

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

OKTOBRO 1979
67-A JARKOLEKTO

5

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Pasis la 64a

La 64a Universala Kongreso de Esperanto jam pasis — nun restas malpli ol unu jaro ĝis la venonta, la 65a. Kaj ĝi okazos en Stockholm, meze inter ni.

Tio estis la penso, kiu trafis min subite, survoje hejmen de la lucerna kongreso. Tio, kio antaŭ nelonge ankoraŭ estis ie en la nebula estonteco estis subite baldaŭ okazonta realaĵo. Kaj subite ankoraŭ frapis min la scio, ke restas ankoraŭ amaso da farota laboro.

Tiuj, kiuj surprenis sur sin la taskon organizi la venontjaran kongreson vizitis la ĉijaran kun speciala celo: kiel eble plej multe lerni el ĝi. Ili iris en ĝi kun speciale malfermitaj okuloj — kaj rimarkis, ke ankoraŭ laiaj svedaj kongresanoj pritraktis la kongreson kun similaj okuloj, ankoraŭ ne konsciaj, ke ili venontjare estos bezonataj por funkciigi la kongreson same aŭ, se tio eblas, pli glate ol funkciis la kongreso en Lucerno.

Al Lucerno venis pli da kongresanoj ol oni atendis. Tio estis rimarkebla dum la grandaj aranĝoj, ekzemple la inaŭguro, kiam la salono apenaŭ sufiĉis. 1635 estis la oficiale aliĝintaj kongresanoj.

La kongreso komenciĝis per oficialaj salutoj de la ŝtataj, kantonaĵaj kaj urbaj reprezentantoj. Speciala gasto de la kongreso estis Robert Muller, sekretario de EKOSOK, la Ekonomia kaj Socia konsilio de UN. Pri lia prelego vi bonvolu turni al la mezaj paĝoj de *La Espero*.

Ankaŭ diplomatoj ĉeestis, i a reprezentanto de Svedio, la unu-an fojon post multaj jaroj.

La inaŭguro fermiĝis per



Du bildoj de la inaŭguro de la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno ĉi-somere. Sur la suba bildo parolas la prezidanto de UEA Humphrey Tonkin. (Fotis E Persson)

transdono al UEA de du japanaj pupoj. Ankaŭ pri ili vi bonvolu legi sur la internaj paĝoj.

La kongreso havis kiel kongresan temon «La lingva aspekto de internacia organiziĝo», temo vere interesa, sed mi dubas, ĉu pli ol kelkcento da kongresanoj konsciis, ke entute ekzistas kongresna temo.

Oni pritraktis ĝin dum kunsido, kiun vere kompetentaj diskutantoj ĉeestis, ekzemple Frank Field, kiu estas ĝenerala sekretario de Monda Federacio de Asocioj ĉe UN aŭ ambasadoro Omar Mahmud Muntasser de Organizaĵo por Afrika Unueco. Ankaŭ la informoj donitaj de ili rilate la lingvajn problemojn estis intereseĝaj.

La komitato de UEA dediĉis multajn el siaj kunsidaj horoj al pritraktado de la nova statuto de UEA. Meze de la kongresa semajno multaj ĉesis esperi, ke oni sukcesos fintrakti tiun demandon. Sed dank'al kelkaj kromaj kunsidaj horoj iun vesperon tio povis realiĝi. En la aŭtuno la statutpropono (ĉar daŭre ja temas nur pri propono) iros al «ĝenerala voĉdonado» kaj espereble jam venontjare ĝi ekvalidos. Tiu pri statuto estas demando, kiu dum jaroj kaj jaroj tiriĝis en la asocio.

Sed krom pri statuto la komitato ankaŭ povis diskuti pri ĉiutagaj problemoj. Ĝi akceptis du novajn aliĝintajn landajn asociojn, Ĉilion kaj Portugalon, tiel ke UEA nun havas entute 42 aliĝintajn landajn asociojn.

(daŭrigo interne)

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Mygdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen:
Sven Alexandersson,
Åke Blomberg,
Anita Lindblom
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12 - 3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, juni, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1979

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Hägervägen 31
(T-station Tallkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12 - 3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
(utan tidning) 15 kronor
Prenumerationsavgift för
La Espero och *Esperanton* nytt
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress:
Fack, 20042 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppetider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Ströme
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg

JESUONE

Vänta med anmälan till nästa nummer

Nästa års internationella kongress närmar sig med stormsteg. För att göra det lättare för dig att anmäla dig, kommer anmälningsblanketten att bifogas nästa nummer av *La Espero*. I samma nummer kommer du att hitta också en kort beskrivning om hur man använder blanketten.

Unua bulteno har skickats till samtliga klubbar för distribution till medlemmarna. Om du inte fått ditt exemplar, vänd dig till klubbstyrelsen.

Brevmärken klara! Beställ nu!

Nu är de här! Brevmärkena som gör reklam för nästa års esperantokongress. Tre färger: gult och blått som i svenska flaggan och så grönt som i en grön stjärna.




Märkena säljs direkt från kongressarrangörerna, och de är billigare än fjolårets märken. Man får fem blad för en tia, och då ingår porto också. Använd dem flitigt! Du beställer så här: Sätt en eller flera tiar på postgiro 4 31 79 92-8, 65a Universala Kongreso de Esperanto. Upplagan är begränsad, så beställ redan nu så många som du beräknar att använda fram till kongressen. Låt inget brev eller kort gå utan brevmärke!

SEJU återkommer till Bredsand

SEJU har förra träffen i Bredsand, Enköping, i gott minne och återkommer ditt den 19, 20 och 21 oktober i år. Träffen är för esperantokunniga, nybörjare och blivande nybörjare. Du behöver alltså inte kunna esperanto för att vara med.

Unua bulteno Stockholm

65a Universala Kongreso
de Esperanto
2—9 augusto 1980



Träffen börjar den 19 på kvällen.

Under träffen kommer man bl a att sjunga och dansa, laga mat, äta och dricka, men också att lära sig esperanto.

Man ska ha lakan eller sov-
påse med sig, sångböcker och
musikinstrument, papper, pena,
oömma kläder och bra skor.

Priset är som vanligt lågt: 80
kronor för dem som är under
tjugo, 95 för alla mellan 21 och
30, och 105 för alla över 31.

Detta enorma belopp ska sät-
tas på postgiro 4 30 73-3, Jan
Setréus.

Kongressaffischen nu nästan slut

Kongresskommittén för Stockholmskongressen har med stöd från Turistrådet gett ut en vacker affisch om Sverige och kongressen, där fyra Sverigebilder i färg ingår. Affischen har redan distribuerats till olika esperantoorganisationer utomlands och till olika beställare och är i det närmaste slut. Vi kan därför inte distribuera den till svenska klubbar, vilket vi beklagar.

Restas eksempleroj de *La Espero*

La Espero 4/79 aperis en iom pli granda kvanto ol kutime kaj estis dissendita ankaŭ al ĉiuj parlamentanoj. Sed ankorau restas kelkcent gazetoj. Se

vi povas utiligi ilin, vi povos ricevi ilin je tre favora prezo: 10 kronoj por 10 gazetoj. Bonvolu nur sendi 10 kronojn al pĝ 20 12-3, Esperantoförbundet, kun la surskribo «10 *La Espero* 4/79».

Bonvena mono por bona celo

3000 kronojn ricevos SEJU de SIDA, la Sveda Aŭtoritato por internacia Disvolvo. Por tiu mono SEJU produktos broŝuron pri lingva diskriminacio en la tria mondo. Laŭ la planoj la broŝuro estos preta jam en la aŭtuno.

Recenzo pri esperantolibro

En numero 1979:1 de *Historisk Tidskrift* aperis mallonga recenzo de *Esperanto en Perspektivo*, la volumego, kiu prezentas la ĝisnunajn atingojn de esperanto.

Kvankam la libro jam aperis en 1974, la revuo akceptis recen-
zon tutajn kvin jarojn poste. Eble kvin jaroj ne gravas en la historia perspektivo. Aŭtoro de la recenzo estas Leif Gunnar Karlsson, la sama, kiu estas redaktoro de *ktp*, la folio de SEJU.

Anstataŭ *Semajno* — MONATO!

Antaŭ unu jaro *La Espero* anoncis la aperon de nova semajna revuo «*Semajno*», kiu tiam aperis per provnumero. «*Semajno*» neniam realiĝis, plej verŝajne pro la tro alta abonprezo.

Sed ek de januaro 1980 aperos MONATO, laŭ la sama redakcia koncepto kiel «*Semajno*»: 40 paĝoj, riĉe ilustrita kaj kun artikoloj el ĉiuj kampoj de la moderna vivo.

La projekto ŝajnas esti same ambicia kiel tiu de semajna revuo, sed ĝi staras sur pli stabila bazo: monata apero estas io, kion la esperantistoj kapablas subteni (la abono estos de 110 ĝis 120 svedaj kronoj po jaro) kaj al la ĉefredaktoro Stefan Maul aliĝis la prestiĝa eldono Torben Kehlet/Stafeto. Pri la abonkondiĉoj kaj mendoj vidu apartan anoncon en tiu ĉi numero de *La Espero*.

Ni deziras al «*Monato*» longan kaj vigan vivon.

Ekspozicio en Lysekil

En Lysekil ne ekzistas esperantoklubo, sed tio ne malhelpas al la membroj de SEF tie aktivi. La unuan de majo ili aranĝis ekspozicion en la Popola Domo kune kun aliaj lokaj organizoj. La esperantoekspozicio, aranĝita de Sven Utberg, Barbro Karlsson kaj Henry Laneby ricevis lokon tuj ĉe la enirejo en la t n «malfermitan domon». Bedaŭrinde ne eblas reprodukti en *La Espero* la kolorfotojn, kiujn Sven Utberg sendis pri la ekspozicio.

«Sven veturas» en nova disko

«Sven veturas Volvon, sed Siv kolektive ...» Komenciĝas unu el la du kantoj, kiuj troviĝas sur nova disko, kiu aperis en ... Svedio. Espereble tio estas nur unua en longa vico da diskoj, kiuj aperos sub la etikedo «Esperantodisko».

Iom pli pri la disko: La kanto «Sven kaj Siv» estas verkita de Reine Svensson, kiu ankaŭ kantas ĝin. La tradukon el la sveda tamen prizorgis Märtha Andréasson. La kanto estas eta kontribuo al la debato pri seksa egaleco.

La dua flanko enhavas tradician kanton: «Vivu la stel!», kantata de Reine Svensson.

La diskon eldonis societo, fondita ĝuste kun la celo eldoni diskojn en esperanto: Esperanto-Disko AB, 2265, 425 90 Hisingkärra; je tiu adreso ankaŭ eblas plej taŭge mendi la diskon. Ĝi kostas 15 kronojn po ekzemplero (plus tri kronoj por sendkostoj). Se vi mendas 5 diskojn

vi ne bezonas pagi la sendkostojn. Se vi mendas pli grandajn kvantojn vi eĉ ĝuas rabaton: 10% je mendo de 10 diskoj, 20% je mendo de 35 diskoj, t e de unu plena kartono. Plej facile vi mendas per simpla pago al la poŝtgira konto 84 19 89-7, Esperanto-Disko Ab.

La disko jam troviĝas en la arkivoj de Sveda Radio, do vi ofte deziru, ke ili aŭdigu ĝin.



Publika danko de Oskar S.

De Oskar Svantesson ni ricevis la jenan mesaĝon kun peto pri publikigo. Kaj tion ni volonte faras.

«Mi dankas al tiuj esperantistaj amikoj, kiuj per donacoj, floroj kaj persona ĉeesto faris mian 75-jariĝon granda jubileo kaj kortuŝa festo. Mi devus nome mencii plurajn, sed la nenomatuloj bonvolu pardoni al mi, kiam mi mencias, ke la subita apero en mia hejmo de Jan Strönne, Kerstin kaj Sven Alexandersson kaj Lennart Åberg kaŭzis ĉe mi surprizan ĝojon, kiam ili per afablaj vortoj, ŝultrabatetoj kaj transdono de bela orkideo honoris «la plej bonan esperantiston de la Mondo». Denove dankon al ĉiuj!»

HODIAŬ

Kun triobla celo: pli forta, pli aktiva kaj pli sukcesa

Eble vi rimarkis, ke la kvanto de aranĝoj de SEF dum la lastaj jaroj iom pliampleksiĝis. Dum multaj jaroj la sola aranĝo de SEF dum la jaro estis la ĉiujara landa kongreso, ofte kun ambicia kaj tre premita programo. Poste komencis aperi io, kio nomiĝis «konferenco» aŭ «seminario», kio esence estis plankunvenoj pri kelkaj kampoj, kie la agado lamis. Du fojojn ĝis nun okazis semajnfinaj kursoj (en Jönköping kaj Karlskoga) kaj estas la intenco de la estraro de SEF daŭrigi tiujn aranĝojn, ĉar ili montriĝis kaj bezonataj kaj popularaj. Do ankaŭ venontjare okazos semajnfinaj kursoj por kursgvidantoj, laŭeble eĉ du: unu printempe kaj unu aŭtune.

Kiel se tio ne sufiĉus — apud la aranĝado de la jarkongreso de SEF en Hallsberg kaj de la 65a UK en Stockholm — la estraro dum sia lasta kunveno priparolis aranĝadon de ankoraŭ almenaŭ unu semajnfina aranĝo, kiu temu pri informado/reklamo aŭ io simila. Se montriĝos taŭge, tiu aranĝo okazos kunlabore kun la Suda distrikto de SEF. Revenas en la planoj ankaŭ la ideo pri planseminarioj, el kiuj unu okazos fine de januaro kaj temos pri starigo de ia ekonomia entrepreno, pli precize pri presejo.

Al esplorado pri starigo de propra presejo kondukis tri faktoroj: la ideo, ke oni devos pli ekonomie utiligi la maŝinaron, kiun ni jam posedas; la fakto, ke ne eblas rapide komposti la novan sved-esperantan vortaron per nur idealistaj laborfortoj; kaj la postulo krei kondiĉojn, laŭ kiuj eblas havi dungitojn en la sveda esperantomovado.

La punktoj menciitaj ĉi-supre (kongresoj — kursoj — presejo) ne ŝajnas havi multon komunan. Sed ili havas: temas pri nova agado, pri klopodoj eliri el la malnovaj rutinoj kaj krei eblecojn pri pli ampleksa agado. Sed tiuj klopodoj ne devas resti nur je la landa nivelo — oni devas same trovi novajn labormetodojn kaj pli bonajn laborkondiĉojn ankaŭ je la loka nivelo. Pri tio devas okupiĝi ne nur la estraro, sed ĉiu unuopa membro. Ke la nunaj metodoj ne donas kontentigajn rezultojn (nek tutlande nek loke) ne estas nekonate. Ni kreu komune tiajn kondiĉojn, ke ni povos eliri el la nuna evolustadio al stadio kun pli forta, pli aktiva kaj pli sukcesa SEF.

Franko Luin

Gör det nu!

Nu är det tid att betala UEA-avgifterna för år 1980:

MA (medlem med årsbok och tidningen Esperanto) 140 kr
MJ (medlem med årsbok) 56 kr

Tillägg till ovanstående avgifter:
SZ (medlem i Societo Zamenhof) 280 kr

UEA behöver allt stöd för att kunna genomföra sitt arbete. Vi kan stödja UEA ekonomiskt genom medlemskap i Societo Zamenhof. Fler svenskar borde vara med!

Du betalar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto. Anteckna på talongen vad betalningen gäller.

Vizito al Ĉinio — kun Aniaro en la valizo

Por plej digne povi prezenti en Oriento la noveldonitan ANIARO Eldona Societo sendis ĝin kun sia speciala sendito Sune Ahlm, kiu vizitis Ĉinion en aprilo. Kaj jen lia raporto:

Post du jaroj da vojaĝpreparoj, tio signifas: legado de 17 libroj pri Ĉinio, abono de *El Popola Ĉinio* kaj membriĝo en la sved-ĉina amikeca societo, mi estis preta anonci mian partoprenon en grupvojaĝo printempe 1979. Kune kun 20 aliaj scivolemuloj en ĉiuj aĝoj inter 20 kaj 70 jaroj mi estis bonvenigata en Arlanda de nia gvidanto, la konata filmisto Bo Gärtze, jam 6-foje vizitinta Ĉinion. Per aviadilo tra Frankfurt-Zürich-Beograd ni atingis Pekinon post 23 horoj (kelkore malfruigintaj en Beograd pro serĉado de bombo!).

Bovenigis nin turismoficeja reprezentanto Chou Laiwei per alparolo en tre klara sveda lingvo (kvankam li ankoraŭ ne havis eblecon viziti nian landon). Unue ni konstatis, ke Peking ŝanĝis sian nomon kaj nun estas Beijing. La signifo tamen restas la sama: la norda (ĉef)urbo same kiel Nanking nun estas Nanjing, t e la suda urbo. (Fine mi komprenas, kial oni nomas la svedan urbon Norrköping per la karesnomo Peking!)

Jam la duan vesperon, helpe de Laiwei, mi havis eblecon renkontiĝi kun kvar esperantistoj. Tri el ili laboris ĉe la redakcio de *El Popola Ĉinio*, nome s-ano Ko Ifan, Hou Zhiping kaj s-anino Tan Xiuzhu. La kvara, s-ano Zhang Zai, prizorgas la esperanto-sekcion de Guozi Shudian, la entrepreno, kiu eldonas librojn kaj gazetojn en fremdaj lingvoj. Ni interkomunikis tre facile kaj havis kelkajn agrablajn horojn kune. Je ĉi tiu okazo mi havis la ĝojon prezenti kaj transdoni ekzempleron de noveldonita Aniaro, ke ili povu ĝui la poezian fikcion de ĉi tiu majstroverko de nia moderna sveda literaturo. Por transdono al iliaj svedaj kolegoj, la estro de Eldona kaj la ĉefprizorgantino en Malmö, oni petis min kunporti ĉarmajn murpendaĵojn. Mem mi ricevis belan silkpentraĵon kun pandoj, kiuj nun bonvenigas vizi-

tantojn en mian hejmon (apud perlukurteno ricevita antaŭ dudeko da jaroj de esperanta amiko en Hong Kong).

Ni interparolis plej multe pri la gazeto *El Popola Ĉinio*. Ili trovis, ke ĝia abonantaro malkreskis en Svedio kaj miris pri tio, ĉar ili ja strebas ĉiel plibonigi la gazeton kaj prezenti pli kaj pli varian enhavon. Por mia vojaĝo la gazeto estis bona fonto donante tre interesajn artikolojn pri historio kaj arkeologio, sed kompreneble ankaŭ pri la moderna Ĉinio kaj ĝiaj ambicioj krei pli bonajn kondiĉojn por siaj ĉ. 900 milionoj da enloĝantoj (de 55 diversaj naciecoj). La gazeto estas abunde ilustrita kun multaj paĝoj en koloro. Ĝi aperas akurate en la unuaj tagoj de ĉiu monato kaj ampleksas 50 — 60 paĝojn en kolora kovrilo. Permesu al mi ankaŭ substreki la nekutime malaltan abonprezon: 15 kr po jaro, 22,50 por du jaroj kaj nur 30 kr por 3 jaroj. Do iom da reklamo por iel rekompenci la ĉarman akcepton de la ĉinaj samideanoj dum mia vizito.

Mi bedaŭras, ke nia tempo ne permesis pli profundan kontakton, ĉar oni kompreneble estas scivola pri multaj aferoj, veninte el tiel fora lando. Estas, ekzemple, malfacile ricevi informojn pri la stato de la tiea movado, kiom da esperantistoj nun estas



Sune Ahlm
Ko Ifan Zhang Zai Tan Xiuzhu Hou Zhiping

aktivaj. Kaj kiom el la pli frue ekzistantaj nun silentas pro iu aŭ alia kaŭzo. Ni ja ĵus povis legi en *Esperanto* ke Armand Su, konata poeto kaj verkisto, nun estas libera kaj deklarita tute senkulpa post dekjara restado en karceroj, i a pro sia por-esperanta agado. Do, espereble ankaŭ esperanto kaj ĝiaj apogantoj havos eblecon denove ĝui la prosperon de la nova Ĉinio.

Mi ĉi tie transaltas priskribon de la vojaĝo tra la aliaj urboj, Loyang, Xian, Chengdu kaj Canton, al kio mi revenos alifoj, kaj finos per la fino de la vojaĝo, t e Hong Kong. Tie mi havis eblecon, bedaŭrinde nur telefone, kontakti mian malnovan korespondanton Wong Ling Kai. Nia konatiĝo datiĝas de 1954 kaj tial mi kompreneble estis tre scivola pri nia persona renkontiĝo. Pro malsano li tamen ne havis eblecon vidi min, kaj tial ni havis nur telefonan interbabilon dum duonhoron. Li rekomendis min provi kontakti

la delegiton de UEA, s-ro Dirk Brink, kiu estas estro de la plej granda monŝanĝa banko en HongKong. Tion mi faris kaj havis ankaŭ kun li agrablan interparolon. Ĉar lia tempo ne permesis renkontiĝon, li promesis sendi al mi unu el siaj oficistoj, s-ano Lee Teck Shiu. Montrigis ke li estas tre fluparolanta indonezi-ĉina esperantisto. Li dediĉis duonan tagon al nia kunestado, regalis aŭtentikan manĝaĵon en bela ĉina restoracio, kie ĉio gustis eĉ pli bone ol en Ĉinio mem, kaj montris al mi multajn interesajn lokojn kaj aĵojn.

Do la rezulto de la vojaĝo orienten estas por mi: kontakto kun sep samideanoj kaj per tio mi deklaras min kontenta.

(La hejmenvojaĝo de Hong Kong al Vänersborg daŭris 33 kaj duonan horojn. Sufiĉe laciĝe, sed kun tiom da agrablaj travivaĵoj oni facile forgesas malagrablaĵojn).

Sune W. Ahlm

Armand Su reaktivitas kaj skribas al *La Espero*

Inter 1962 kaj 1968 relative ofte aperis en *La Espero* poemoj de ĉina junulo Armand Su kaj fotoj pri li. Unu el tiuj numeroj de *La Espero* estis la 17an de julio ĉijare videbla en la plej granda ĉina junulara ĵurnalo *Zhongguo Qingnian Bao*, apud foto de Armand Su. En longa artikolo, titolita «Nova stelo ekbrilis en Oriento sur nia Literatura horizonto» tiu ĵurnalo prezentis la laboron de Armand Su, en kiu aparte akcentiĝis lia esperantlingva aktiveco, lia amikeco kun Julio Baghy k a. Estis menciata ankaŭ, ke Armand Su estis unue malkovrita de svedoj.



Tiu ĉi artikolo estis disaŭdigita ankaŭ trifoje en la junulara programo de la plej granda ĉina centra radio.

Laŭ informoj en *esperanto* de UEA kaj aliaj gazetoj Armand Su estis malliberigita en aprilo 1968 pro politikaj motivoj kaj poste kondamnita al 20 jaroj. Post pli ol 10 jaroj li liberiĝis kaj estis deklarita tute senkulpa. Nun li denove aktivitas en la esperantomovado.

Armand Su informas, ke li konas tri nordiajn lingvojn — la svedan, norvegan kaj danan. La svedan li lernis mem en 1958 kaj la prononcadon ĉe juna svedino en Tanĵin en 1960.

Armand Su, nun libera kaj denove aktiva en la esperantomovado, inter du lernantinojn, fratinojn.

Multe da muziko en la lucerna UK

La artaj aranĝoj abundis en Lucerno, sed tre malmultajn mi povis sperti mem. Aparte memorindaj estis la svisa vespero, kiu okazis en la granda festhalo de Lucerno, kie kelkmil aliaj ĉeestantoj ankaŭ kunestis.

Ankaŭ cetere abundis la muzikaj aranĝoj, kie artistoj jam konataj de la pli fruaj kongresoj reprezentis sin: Veselin Damjanov, Danielle Béguin, David Hill, Bozena Zborowska, Olivier Tzaut k. a.

La teatro ne kontentigis pasintjare kaj la samon oni povas diri pri la ĉijara prezento. Restas la demando, kiel la Stokholma kongreso sukcesos kontentige solvi tiun flankon.

— UNIVERSALA KONGRESO —

Pupa paro al UEA speciale el Japanio

Tute speciala honorigo atingis la esperantistojn pere de UEA dum la inaŭguro de la 64a Universala Kongreso en Lucerno. Tiam estis transdonitaj al la estraro du pupoj, kiel simbolo de paco. 101 pupparoj estis senditaj entute: 100 al diversaj landoj kaj unu paro al UEA, kiel speciala mesaĝero de paco.

La dissendado de la pupoj aranĝis speciala japana komitato okaze de la Internacia Jaro de la Infanoj, gvidata de s-ino Tenkoko Sinoda, edzino de la japana eksterlanda ministro.

La pupojn akompanas speciala pasporto kun dulingva mesaĝo: angla kaj esperanta. Ĝi diras:

«Karaj geamikoj en la tuta mondo.

Salutojn de la infanoj el Japanio.

Ni kredas, ke la estonta mondpaco dependas de la infanoj.

Estas pro ni ĉi tiu mirinda terĝlobo, kie troviĝas belaj riveroj, altaj montaroj imponaj, blua ĉielo, diverskoloraj floroj kaj amindaj bestoj: ni devas zorgeme protekti ĝin, ĉu ne?

La respondeco por ĉi tiu tasko estas ĉe ni infanoj, kiuj heredas la venontan generacion.

Ni ĉiuj reciproke prezentu bonajn ideojn kaj laboru kune



Ne nur stokholmanoj deĵoris en la ĝiĉeto de LKK. Sur la bildo Signe el Kalmar, Anita kaj Stella el Nynäshamn, Gun el Stokholmo kaj Pelle el Trelleborg. La foton faris M Smith.

«La mondo bezonas vin» deklaris UN-oficisto

ankoraŭ pli vastaj. Kiam mi estis infano oni multe parolis pri esperanto kaj pri mondregistaro. Oni ilin mencias malpli ofte hodiaŭ. Tio ne estas bona. Necesas memori al la ekzistantaj potencoj, ke sur nia planedo eblas aliaj administraj formoj. Tio almenaŭ prezentos tiun avantaĝon, ke ili fariĝos iom pli viziemaj kaj iom malpli nececedemaj. Mi do tutkore deziras, ke el via kongreso fontu aŭdaca strategio, kiu denove tuŝu la imagon kaj la animon de la homoj. Tiun strategion devus akompani apartaj agadoj precipe direktitaj al la internacia komunikado kaj al ties ĉefaj rimedoj aŭ perantoj: UN kaj ties specialigitaj institucioj, la transnaciaj firmaoj, la gazetaro kaj aliaj informrimedoj, la religioj, la internacia edukistemo, la internaciaj transportoj, la internaciaj neregistaraj organizaĵoj, turismo, hoteloj, ktp.

Mi deziras al vi grandan sukceson en la nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin, kaj kiu estas nenio alia — longperspektive — ol starigi mondan demokration, specife pere de la uzo de lingvo universala. La mondo bezonas vin. Unuigintaj Nacioj bezonas vin. Ni ĉiuj devas komune konstrui mondon de paco, de justeco, de progreso, de bonfaro kaj de feliĉo.»

La lastajn tri frazojn Robert Muller aldonis en esperanto kaj ili ne troviĝas en la tekstotraduko distribuita al la kongresanoj. Sian simpation al esperanto li konfirmis ankaŭ pli poste dum la kongresa semajno per letero adresita al la prezidanto de UEA.

La ĉefa gasto de la Lucerna kongreso estis sendube Robert Muller, la sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. Lia parolado bone enkondukis la kongresan temon, sed li ankaŭ tute rekte preparolis esperanton, i a per la jenaj vortoj:

«Mi opinias, ke ... la esperanto-movado kaj via kongreso povas ludi gravegan rolon. Ne pro tio, ke monda registaro aŭ komplementa malarmado aŭ universala lingvo nun ne ŝajnas ebla, oni evitu tion preparoli kaj diskuti. Tute male. La mondo senĉese bezonas modelojn, kiuj impresu al la imago kaj al la mondovizio de la homoj. Ni bezonas revojn. Preskaŭ ĉiuj grandaj mutacioj en la historio rezultis el revoj kaj pensoj viziaj. Eble hodiaŭ la mondo ne plu revas sufiĉe. Eble tial ni pasas tra pesimisma fazo ĝuste tiam, kiam ni staras je la montopinto de senprecedencaj sukcesoj kaj eĉ promesoj



65a UK

Anmälningsblanketten för Stockholmskongressen bifogas nästa nummer av *La Espero*. Men redan nu går det att betala kongressavgiften. Fram till 31 december gäller följande:

1 Icke medlem i UEA	380 skr
2 Medlem med årsbok	330 skr
3 Medlem med årsbok och «esperanto»	250 skr
4 Make/maka till (1)	260 skr
5 Make/maka till (2) eller (3)	230 skr
6 Ungdom t o m 20 år	120 skr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	190 skr
8 Synskadad	150 skr

Upplýsingar hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040-65209).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto.


Muzikaj instrumentoj temo de nia leciono

Plej verŝajne vi ne ĉiutage vizitas koncertojn. Sed eĉ se vi apartenas al la grupo de homoj, kiuj nur aŭskultas leĝeran muzikon, vi ne povas eviti ne aŭdi jen kaj jen muzikpecon de tiu klasika karaktero. Tre ofte tian muzikpecon ludas simfonia orkestro. Pri la muzikiloj uzataj en tia orkestro temas la ĉinmera ĈIUTAGA ESPERANTO.

to. Belegas la muziko de Carl Nielsen (La nebulo levigas) kaj de Gluck (Danco el lia opero Orfeo kaj Eŭridiko).

Klarneto estas tre uzata instrumento, kie la sonon kaŭzas vibrado de anĉo.

Du anĉoj donas sonon al **hobojo**, kiu sonas milde, kvazaŭ pasturale. La tri lastaj instrumentoj ekzistas en pluraj gran-



Kordinstrumentoj estas la kerno de simfonia orkestro. Granda orkestro kiel tiu de la Sveda Radio havas 64 da ili: 18 unuaj violonoj, 16 duaj violonoj, 12 aldoj, 10 violonĉeloj kaj 8 kontrabaso.

Ĉiuj ĉi instrumentoj estas simformaj kaj ricevis sian definitivan formon en la 16a jarcento, kiam la konataj violonkonstruistoj Stradivari, Amati kaj Guarneri en Cremona konstruis siajn ankoraŭ hodiaŭ nesuperitajn instrumentojn.

Violono estas la plej malgranda en la familio, la **aldo** kaj **violonĉelo** mezgrandaj kaj **kontrabaso** la plej granda el ili.


Al la grupo de kordinstrumentoj apartenas ankaŭ **harpo**, kiu laŭaspekte kaj laŭ sia tonriĉo elstaras inter ili.

Alia granda familio estas la **blavinstrumentoj**, inter kiuj la **lignaj blavinstrumentoj** pli riĉas laŭ vario.

Plej simpla laŭ aspekto inter ili estas **bekfluto**, necesa en ĉia muziko de la renesanca kaj baroka epokoj. Ekzistas tuta familio da bekflutoj, de la plej malgranda fluteto, kiu sonas unu oktavon pli alte ol la soprano, ĝis la basa bekfluto.

Transversa fluto, aŭ nur **fluto**, estas ŝatata solo-instrumento.

- 1 bekfluto
2, 3 flutoj
4, 5 klarnetoj
6, 7, 8 hobojoj
9 fagoto



ETA VORTOLISTO

violono *fiol*, *violin*
violonĉelo *cello*
kontrabaso *kontrabas*
aldo *altfiol*
bekfluto *blockflöjt*
transversa fluto *tvärflöjt*
klarneto *klarinet*
hobojo *oboe*
alda hobojo *engelskt horn*
fagoto *fagott*
trumpeto *trumpett*
trombono *trombone*
korno *valthorn*
tubjo *bastuba*
saksofono *saxofon*
tamburo *trumma*
gongo *gong*
cimbalo *cymbal*
ksilofono *xylofon*
timpano *puka*
sonorilo *klocka*
anĉo *rörblad*


doj kaj sekve ankaŭ diversaj baztonoj: ekzemple aldohoboj kaj hobojo de amo, ofte uzita de Bach.



La baso en tiu ĉi grupo nomiĝas **fagoto**.

El la **latunaj blavinstrumentoj** la plej konata estas **trumpeto**. Ĝi funkcias per sistemo de ventiloj, kiuj longigante pli aŭ malpli la vojon de la aero tra la instrumento, kaŭzas pli aŭ malpli altajn sonojn.

Al la sama familio apartenas



ankaŭ **trombono**, **korno**, **tubjo** kaj **saksofono**. La ĉi-lastata estas iom aparta kaj povas esti karakterizata kiel io inter klarneto kaj hobojo, sed latuna.

Al simfonia orkestro apartenas ankaŭ diversaj perkutinstrumentoj (frapinstrumentoj), ekzemple **tamburoj**, **gongo**, **cimbalo**, **ksilofono**, **timpano**, **sonoriloj** kaj **tintiloj**. En pli moderna muziko ankaŭ ĉio alia estas pensebla.

Vi eble rimarkis, ke **fortepiano** ne estis menciita. Ĝi fakte ne apartenas al ordinara instrumentaro de simfonia orkestro. Oni kompreneble uzas ĝin, kiam la komponaĵo tion postulas, ekzemple en pianokonzerto.

Laŭ artikoloj en Vi kompilis
Franko Luin

Elever om esperanto i specialarbete

«Specialarbete: Esperanto» heter ett häfte, som två elever i Halmstad åstadkommit, nämligen Hans Olof Roth och Johan Laurin. Det är inte första gången någon valt esperanto som ämne för sitt specialarbete — tvärtom får SEF rätt ofta förfrågningar om material för sådant ändamål.

Författarna ger lite historik, grammatik, information om esperantos ställning i dag på olika områden o dyl. Vad som är intressant är deras «Slutsats». Låt oss citera den:

«I dagens svenska skola har modersmålsundervisningen kommit i skymundan och i stället tvingar man alla elever att slösa tid och arbete på att plugga främmande nationalspråk, som man ändå aldrig kommer att behärska. Detta skapar förutsättningar för svåra störningar både i vardagslivet här hemma och vid umgänget över gränserna. Detta tycker vi är ansvarslös skolpolitik. För inte ens SÖ kan väl med rent samvete hävda att språkundervisningen idag gör alla, eller ens flertalet elever, särskilt språkkunniga.

Idag räcker det inte att kunna ett främmande språk. Man måste ha bra kunskaper i två eller tre språk för att kunna följa med vad som händer inom ett fackområde.

De nationella språken är så invecklade och så oregelbundna, att bara ett litet fåtal människor kan lära sig dem på ett tillfredsställande sätt. Och då är det oftast de som haft råd eller tillfälle att vistas i landet ifråga under en längre tid. De flesta av oss behärskar inte något främmande språk för att kunna t ex delta i debatter.

En lösning på den nuvarande omöjliga språksituationen är att ta i bruk det neutrala internationella språket esperanto.

Under de 80 år det existerat har det utvecklats så att det idag visar sig vara fullt dugligt i alla sammanhang. Det är känt, att det är ett lätt språk att lära sig också för personer med lägre utbildning. En viktig psykologisk faktor är att de personer som talar det har en känsla av att det är deras eget språk och inte ett främmande, eftersom esperanto inte tillhör någon viss nation.

Det kunde bli en lösning på

språkproblemet.

Man skulle kunna vinna ekonomiskt på att införa esperanto. Man räknar med att enbart i FN kostnader för översättning, tolkning och därmed sammanhängande arbeten uppnår en summa av mer än 20 miljarder dollar årligen.

Om man tänker på alla internationella organisationer, alla konferenser, kostnader för varje delegation, kostnader inom turismens, handelns, vetenskapens och kulturens områden, kostnader för undervisning mm kan man utan överdrift säga att summan når upp till miljarder dollar varje år.

Införandet av esperanto vid alla internationella kontakter skulle innebära en besparing av några miljarder dollar, som skulle kunna användas t ex som hjälp åt utvecklingsländerna, eller rent allmänt för utbildnings- och kulturändamål.»

Böcker finns: det är du som skall läsa dem!

Esperantoförlaget gick i våras ut med en speciell kampanj bland svenska folkbibliotek. Resultatet blev en hel del beställningar, som expedieras nu i höst.

Det har naturligtvis betydelse för esperantorörelsen, att vi är representerade i biblioteken och det visade intresset är glädjande. Men för fortsatta framgångar är vi beroende av att esperantolitteraturen också blir efterfrågad och utlånad.


Här är ett område, där vilken esperantointresserad som helst kan göra en insats. Vi vädjar därför till alla svenska esperan-

tister att vända sig till sina respektive bibliotek och fråga efter esperantoböcker. Du vet väl, att du kan gå till ditt lokala bibliotek och fråga efter praktiskt taget vad som helst. Vad biblioteken inte har hemma försöker de skaffa från de centrala biblioteken eller köpa hem.

Även om du är helt ensam på din ort som esperantist, kan du alltid kontakta ditt bibliotek och fråga efter esperantosamlingen eller önska någon särskild bok. Och gör det inte bara en gång, gör det till en vana att låna esperantoböcker genom biblioteken. **Åke Blomberg**

ANLARO

*Årets bokhändelse!
Årets lämpligaste julklapp!
Inbunden 70 kronor hos
Esperantoförlaget,
Fack, 200 42 Malmö*



SEMAJNO mortis, vivu

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet/STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan Maul

40 paĝoj DIN A4 - riĉe ilustrita
11 kalendaroj jare - jara abono:
49,50 gmk aŭ 800,- b.fr.

Ekde januaro 1980 aperas ĉi tiu revuo kun multaj interesaj artikoloj el ĉiuj kampoj de moderna vivo: politiko, ekonomio, kulturo, scienco, tekniko, modo, kuirarto, sporto, turismo kaj multaj aliaj. Kun apartaj paĝoj por infanoj kaj junularo, kun distraĵoj, noveloj, satiroj, enigmoj kaj konkursoj.

Propraj kunlaborantoj en pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj.

MONATO estas la revuo por esperantistoj de ĉiu aĝo, ĉiu medio, ĉiu lando. Tuj abonu!



Al eldonejo TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio

poŝtĉekkonto 000-0422856-33

Jes, ankaŭ mi volas legi la revuon MONATO.

Mi abonas por 1 jaro

Mi petas pliajn informojn

Nomo: _____

Adreso: _____

Skribu maŝine aŭ preslitere!

Uzu la vintron por skriba ekzercado!

Jen aŭtuno kaj komenciĝo de la aŭtuna studsezono. Kaj ĉiaŭtune kaj vintre ni studos eĉ pli ol kutime! Ni ja devas poluri nian esperanton antaŭ la venontjara Universala Kongreso en Stockholm. Kial ne kombini la studadon per korespondado? Elektu inter la trideko da adresoj ĉi sube kaj — bonan sukceson!

Korespondi deziras:

Inĝeniero pri vinkulturado, lia edzino kaj 12-jara nepino volonte korespondus pri ĝeneralaj vivtemoj. Inĝ. Oldrich Šýkora, str. Kokorinská 1858, CS-27601 Mělník, Ĉeĥoslovakio.

22-jara polo, kiu interesiĝas pri poezio, ŝakludo, foto, turismo, junulara muziko. Marko Ulanowski, w. Strupin Mały 17 skr. 16, PL-22-100 Chelm, Poll.

Iranano deziras korespondantojn.

No 14, Ladan st., Lashkar st., Ahvazo, Irano.

36-jara teknikisto pri mekaniko.

Ferencz Szika, Csalogány ut. 45, H-3200 Györgyös, Hung.

Grupanoj, ĉefe studentinoj, sopiras pri skriba kontakto. Ĉu iuj skandinavoj skribos al la gvidanto de unu el la plej grandaj grupoj en Ĉeĥoslovakio? Josef Vitek, poŝtkesto 25, CS-27680 Mělník, ĈSSR.

39-jara poŝtoficisto kies hobioj estas migrado, amatorfotografado kaj popolmuziko, ŝatus korespondi kun samprofesuloj aŭ saminteresuloj. Karl Sautter, Neuffener Str. 19, D-7435 Hülben, FRG.

Ĉu korea korespondanto? Juna, maljuna, vira, virina, studenta, oficista, komercista — nur indiku vian preferon. Korea Esperanto-Asocio, CPO Kesto 4258, Seulo, Korea Respubliko.

23-jara oficistino, interesiĝas pri literaturo, lingvistiko, moderna kaj klasika muziko, turismo. Maria Czopek, str. Teligi 20/57 PL-30-900 Nowy Prokocim, Krakow 47, Pollando.

Sendu bildkarton al Wolfgang Schade, Otto-Grotewohl-Str. 9a, DDR-8252 Coswig, GDR.

Pri historio, literaturo kaj naturo interesiĝas Ing. Josef Festa, CS-50782 Pecka 85 Ĉeĥoslovakio. Pri tiuj temoj li volonte interŝanĝus librojn, ankaŭ naci-lingvaj.

40-jara oficistino deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, esperantajn librojn, bankbile-

tojn kaj gramofondiskojn. Marijka Siderova, Blok «Montaj 1» vĥ G, ap 4, BG-5500 Loveĉ, Bulgario.

Amikojn en la tuta mondo serĉas 17-jara iranano. Behrouz Kaven, PO Box 101, Khoy Irano.

Kun sveda fraŭlino ŝatus korespondi 19-jara hungaro (pri naturo, amo, vojaĝoj, muziko). Ludoviko Vajó, Lévai út 33.VII. 68, H-2040 Budaörs, Hung.

Junulinoj! Jen 22-jara brazilano por vi! Interesiĝas pri poŝtkartoj, poŝtmarkoj, fotoj. P. Tenório Vaz, Caixa Postal 82, 50.000 Recife-Pe, Brazilo.

— BÖCKER —

En lista om böcker för dig som vill läsa



«Han talar esperanto som en inföding». Känner du igen det här gamla skämtet?

Nej, med undantag av ett fåtal «denaskaj esperantistoj» finns det ingen som har esperanto som modersmål. Vi måste alla lära oss det, och det är ju också esperantos idé: att vara allas andra språk, inte första.

När det gäller att tillägna sig ett främmande *nationellt* språk, är bästa sättet att efter grundläggande studier bo i landet en tid. Även vi esperantister har möjlighet att resa ut och tillbringa en tid i internationell esperantomiljö.

Men det kan inte alla, och vad gör man då? Man deltar i kurser. Från nybörjarkursen går man vidare till olika fortsättningskurser och konversationscirklar. Bra!

Och man läser. Det finns ingen möjlighet att tillägna sig

Geofizikisto serĉas kontakton kun samfakuloj. Lukács András Budafoki ut. 81, II.8, H-1117 Budapest, Hungario

Italo 23-jara, kiu eĉ parolas la svedan ŝatus korespondi kun junaj gesvedoj. Marco Giovannoni, via Alighieri 5, I-50055 Lastra a Signa, Italio.

Pola instruistino serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj 8 ĝis 18-jaraj. Barbara Chmielewska, Esperanto-Klubo, Palaco de Junularo, PL-00-901 Varsovio, Pollando.

Du 29-jaraj ĉeĥoj bezonas perfektigi en esperanto. Peter Tlapák, Okt. rev. 13, kaj Jaroslav Buchta, Šturova I, ambaŭ CS-909 01 Skalica, Ĉeĥoslovakio.

Vi, kiu ludas fluton! Tuj skribu al Arai Toshio, kiu estas 28-jara flutisto-diletanto. Li ankaŭ interesiĝas pri multo alia. Lia adreso: Hidaka-cho, Chisaka 75, Hokkaido Saru-gun, 079-23

Japanio.

La 26an de decembro 1939 naskiĝis Wolfgang Hofman, kiu nun serĉas korespondamikojn en Svedio. Li estas diplomita inĝenierekonomiisto por maŝinkonstruado. Adreso: Käthe-Kollwitz-Str. 24, DDR-7144 Schkeuditz, GDR.

Monerojn, banknotojn, bildkartojn kaj kolektas 59-jara ŝuisto. Josef Kozłowski, PL-88140 Gniewkowo (pow. Inowrocław), Pollando.

Bulgara studento ŝatus gastigi svedan familion. Korespondu kun Ljubomir Mitzev Valčanov, Prohod Sv. Nikola 12, Svištov, Bulgario.

Bokso kaj futbalo, sed ankaŭ muziko, filmo kaj filatelio estas la interesoj de 25-jara Ryszard Stempień, ul. C. Skłodowskiej 9, PL-59-840 Zawidow, Poll.

23-jara altlerneja studento kun tre tre granda intereso pri diskoj. Ladislao Nemeth, Káptalandomb 7, H-9021 Győr, Hungario.

Radioteknikisto 28-jara senpaciencie atendas leterojn. Andrzej Kosinski, ul. Sieniawska 17/13, PL-68-200 Zary, Pollando.

Kun studentinoj (gravas la -in-) dezirus korespondi Youichi Arai, 590 Nishida Okabe-machi, Osato-gun Saitama-ken, 369-02 Japanio.

Polaj geedzoj (30 + 24) interesiĝas pri turismo, arkitekturo, mekaniko kaj esperanta literaturo. Andrzej Sledziński, ul. Libelta 12/2, PL-44-100 Gliwice, Pollando.

Voletas korespondi du 22 resp. 21-jaraj administrantinoj. Margit Juhász kaj Eva Juhász, Arany János út 4, H-2234 Maglód, Hungario.

25-jara telefonmuntisto tre deziras ricevi korespondanton en Svedio. Ŝatas naturon, artojn, bestojn kaj homojn. Sándor Máté, Marx Károly u. 43, H-2364 Ocsa, Hungario.

38-jara oftalmologia fakasistantino serĉas korespondamikojn por si kaj du koleginoj (juna medicina studentino kaj 49-jara kuracistino). Interesoj, krom oftalmologio, bildkartoj kaj poŝtmarkoj, sed ankaŭ anesteologio. Paranoi Lajosné, II. Szemklinika, Mária u. 39, H-1085 Budapest, Hungario.

39-jara hungara juristo el urbo fama pro siaj vinoj, interesiĝas pri arthistorio, lingvoj, vojaĝoj. Dr István Szabó, Cifrakapu u. 126/6, H-3300 Eger, Hungario.

Betty Németh estas vigla kaj gaja 62-jarulino, kiu ŝatas vojaĝojn, muzikon, esperanton. En julio ŝi vizitis Stockholm kaj opiniis ĝin belega. Skribu al ŝi! Adreso: Léka János tér 3, Budapest XII, H-1124 Hung.

ett språk, inte ens esperanto, bara genom kurser en kväll i veckan under vinterhalvåret. Man måste skaffa sig ett ord-förråd och bli van att själv hantera språket; man måste *läsa*.

Gör det till en vana att varje dag läsa åtminstone ett kort stycke på esperanto! Är du nybörjare, går det trögt i början, men du märker snart, att hindren bryts ner och du kan följa texten.

Esperantoförlaget har en hel del att bjuda på för alla smaker och för alla kunskapsgrader. Vi förmedlar också prenumerationer på utländska esperantotidningar. Se våra annonser och kontakta oss gärna för råd om lämplig litteratur. Vår nya illustrerade boklista får du från Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö, mot 1:50 i frimärken.

Åke Blomberg